

Heinrich Heine,  
 Vin kantflugile, kara  
*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Vin kantflugile, kara,  
 mi portus de tie ĉi.  
 Sur Ganges-bordo lokon  
 belegan ja scias mi.

Ruĝflora ĝarden' tie kuŝas  
 en lunlumita kviet',  
 la lotusfloroj atendas  
 je l' kora fratinet'.

Violoj ridetas, kisas,  
 rigardas el stela ĉiel',  
 fabelojn odorajn rozoj  
 flustras al si ĉe orel'.

Spionas la piaj, saĝaj  
 gazeloj, saltas kun baŭm',  
 la sankta river' lontane  
 susuras per sia ŝaŭm'.

Kaj tie ni por ripozo  
 kuŝos sub alta palm',  
 kaj trinkos amon, pacon  
 kaj songos pri fea ĉarm'.

*Traduko de la Germana poemo "Auf Flügeln des Gesanges" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 - †1976).*

*Arg-540-1081 (2010-05-22 15:40:11)*

Heinrich Heine,  
 Sur flugiloj de la kanto  
*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Sur flugiloj de la kanto  
 Al Gango vi lasu vin  
 Forporti de via amanto  
 Al plej bela lok', karulin'.

Jen kuŝas en la lunbrilo  
 Floranta lotus-ĝarden',  
 Aperas en la trankvilo  
 Sorĉigaj feinoj jen.

Karese la violetojn  
 Subridi jen aŭdas vi,  
 Rakontas odorajn sekretojn  
 La rozoj inter si.

Gazeloj alsaltas maltime,  
 Mallaŭte nur tra la aer'  
 Aŭdigas de malproksime  
 Susuro de l' sankta river'.

Ni volas ekkuŝi tie,  
 En arbareto sub palm'  
 Ripozu kaj am-ebrie  
 Songadi en nokta kalm'.

*Traduko de la Germana poemo "Auf Flügeln des Gesanges" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-540-1080 (2010-05-23 23:03:44)*

*El la „Libro de l' Kantoj“, lirika intermezo.*